

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe **admonilon**. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Por **Abono** oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 ŝved. kr., 0.30 ŝvis. fk., 0.30 dana aŭ norvega kr., 0.30 peseto, 3½ pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fk., 0.70 liro, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 6 germ. mk. (por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj), 3 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr. (por poloj), 50 pol. mk., 120 aŭstr. kr.; internacie 1 respond-kupono.

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de niaj **Abonejoj** en diversaj landoj — vidu sur paĝo 41. — Germanoj abonu nur ĉe sia poŝtoficejo (kvaronjare 48 mk.); senpra alsendo sub banderolo — kostas por germanoj po numero 7 mk.

**ELDONANTOJ:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gilli North, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonjo)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

**REDAKTOROJ:**  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Fleletona red.: Zanoni.

**ADMINISTREJO:**  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtĉekokonto Köln 7063, por Teo Jung, Horrem.

**ANONCOJ**  
po cm², 0.10 ŝvisa franko aŭ ĉe antaŭpago 6 gmk.  
Ĥebato laŭ interkonsento.

**DUOBLA**  
ABONANTARO,  
**DUOBLA**  
AMPLEKSO.  
Tiel verbu abonantojn el ET!

Numero 93 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 16. Julio 1922.

## Albana Registaro devige enkondukas Esperanton.

Per oficiala letero al D-ro Privat, prezidinto de la Konferenco pri Esperanto en Lernejoj, la Registaro de Albanio informis, ke la Ministaro decidis la devigan enkondukon de Esperanto en ĉiuj duagradaj, superaj kaj komercaj lernejoj, per dekreto n-o 475 de 3. junio 1922.

### To be or not to be.

En artikolo „Ni agu laŭ niaj konvinkoj“ Malgrandnaciono instigas Esperantistojn dediĉi „ĉiun skribitan vorton nur al Esperanto“ — „iri celkonscie al la konstruado de tuthomara kulturo“ — unuvorte: fondi nian literaturon.

En la sama n-o de ET prof. Diez el Bilbao diras: „Multaj Esperantistoj posedas mirindan konon de la lingvo kaj tamen ili ne sentas sin kapablaj traduki libron... kaj ni bezonas riĉan literaturon en ĉiuj fakoj de homa progreso.“

Mi pensas, ke ĉiu el ni tion komprenas, ke ni nepre bezonas posedi propran, se ne „riĉan“ (tio ankoraŭ superas niajn fortojn), almenaŭ decan literaturon originalan kaj tradukan, sciencan kaj artan. Sen ĝi ni ne ekzistos.

Nia afero estas precipe lingva afero. Ĉiuj aliaj belaj celoj, kiujn ni ligas kun Esp. movado, estas nur brila melodio, valora societo, pro kiu ni prave fieras, kune celante la mondharmonion. Sed nia afero sen deca literaturo ne povas prosperi. Eĉ mirindaĵo estas la fakto, ke nia tutmonda lingva organizo ekzistas malgraŭ nia literaturo, en kiu ĝis nun laboris nur eta taĉmento da veraj herooj gvidataj de nia genia Majstro. Se ni atentus nur la kvanton da tiuj laboreguloj, ni devas miri kaj admiri, sed se ni atentus la disvastiĝon de nia lingvo, ni devas ankaŭ miri, miri pri la pasiveco de „Esperantista popolo“.

Simpla Esperantisto traktas plej ofte nian aferon sportmaniere, amatore, — ĝis io alia venos al la kapo, aŭ ĝis „la ĉiutagaĵoj zorgoj malebligas la partoprenon“. — Nia modestulo nepre bezonas vartistinjon, kiu ofte lulkantos al li pri verda stelo pene rampanta idealan ĉielon ktp., ĉar alie li baldaŭ ekdormus por la „sankta afero“. Nia modestulo de tempo al tempo korŝire krias „Vivu Esperanto“, interŝanĝas sensencajn poŝtkartojn, estas ofte fervorega flatelisto kaj plej ofte... pagas neniam kolizojn kaj abonas nenian gazeton.

Estas mire, ke Esperantistoj, kvankam ili apartenas al „mil kaj unu“ nacioj tre diverskoloraj kaj diversmoraj, estas tiel kortuŝe ŝofidaj kaj ŝampensaj rilate al — devoj. Ŝajne Esperantistoj ĝenerale imagas Esperanton, kvazaŭ legendan bovinon, kiun oni povas ĉiam melki kaj neniam nutri.

Estas eĉ honte, ke nia armeo, kiu pretendas ariĝi de idealistoj — svarmas de maroderoj, kiuj almozatendas ĉe vojkruĉoj. Esperantistoj! vi ja scias, ke nia afero estas — devigi la homaron akcepti nian lingvon kaj tiamaniere pli-rapidigi la realigon de aliaj idealoj. Tial do nia lingvo devas esti potenca kaj brila; ĝi povas esti tia nur

kondiĉe, ke ĝi havos bonegan ampleksan literaturon kaj fortan gazetaron.


Por ke gazeto estu interesa, ampleksa kaj eleganta, ĝi devas havi sufiĉe da abonantoj, kiuj are pagos la elspezojn — aĉie plej bona, plej grava gazeto mortos. Sed se abonantoj pagos akurate, ili estas tuj rekompencataj, ricevante seninterrompe bonajn informojn kaj interesajn artikolojn.

Iom alie stas afero pri eldono de libroj.

Certe estas vero, ke Esperantistoj, se ili deziras helpi al kreado de sia literaturo, devas esti pli libracetemaj ol ili estis ĝis nun, sed tio nur parte nin helpos. — Oni devas trovi aliajn rimedojn, ĉar en nia literaturo devas aperi verkoj valoraj, ne nur — facile vendataj. Mi estas certa, ke inter Esperantistoj estas multaj, kiuj kapablos kaj tradukos aŭ originale verkos bonajn literaturajn, kaj mi ne dubas, ke plej multaj el ili estos tiom idealistoj, ke laŭbezone malgraŭ nunaj malfacilaj vivkondiĉoj ili postulos nenion por sia periga kaj valora laboro, kiu tamen estos plenumita kondiĉe, ke la laboro ne estos vana, ke nepre ĝi estos presita, se ĝi tion indos. Alie neniu ion faros. Ne postulu, samideanoj, de viaj plej talentaj kunuloj, tian sensencaĵon, ke ili laboru senpage por la musoj kaj ratoj, kiuj pli frue manĝos manuskriptojn ol vi trovos la monon por eldono.


Tiel do, laŭ mi, sen instigado ni trovos fervorajn kaj taŭgajn laborantojn sur literatura kampo, sed la unua, la ĉefa afero estas garanti la eldonon, t. e. fondi la eldonan kapitalon.

Oni diras, ke Napoleono I-a demandita pri la kondiĉo de militaj sukcesoj respondis, ke nepraĵ estas tri kondiĉoj por venki: 1. la mono, 2. la mono kaj 3. ankaŭ la mono. Ĉu ni „pacaj batalantoj“ pretendantaj la tutan mondon konkiri, devas tion forgesi? Ĉu ni devas naive atendi, ĝis krevos sur tuta terglobo la kapitalisma sistemo kaj ĉiuj paseroj en fruktĝardenoj propra-



Helsinki. — Universitata Biblioteko, konstruita de J. L. Engel.

move ekĉirpos Esperante? Ni ĉesu esti naŭvaj revuloj, kaj se ni deziras venki hodiaŭ, ni uzu la armilon taŭgan por hodiaŭa tago. Se morgaŭ ekbrilos por ni alia matenruĝo, ni ŝanĝos la metodojn kaj alie batalos por la realigo de niaj idealoj. Tutmonda Esperantistaro devas posedi kiel eble plej rapide propran eldonejon, presejon kaj libredponejon. Se ni tion havos, dum unu jaro ni aperigos pli multe da libroj ol ni posedas da ili ĝis nun entute. Koncerne kapitalon por la entreprenon, mi proponus la unufojan, senescantan por ĉiu Esperantisto imposton, ekzemple 0,25% de la lara enspezo (tiel se iu gajnas 6000 fk. jare, li devus pagi por „Fondo de l' Presejo“ nur 15 fk.), tiel malgranda monofero al nenles poŝo kaŭzus la krizon, sed ebligus transiri de senfina deklamado pri „gravecoj“ kaj „utilecoj“ al la konkretaj. Ni agu senprokraste kaj energie kaj ĉesu esti la babilpopolo. Se ni havas sur tuta terglobo nur 200000 Esperantistojn, se 60% el ili estas suĉinfanoj kaj kadukaj maljunuloj ne povantaj ion doni, restas do ankoraŭ 80000, kiuj pagos. Se ni prenos tre malaltan mezcliferon 5 fk., ni ricevos sume 400000 fk. (sen bonvolaĵo oferoj). Per tiu sumo oni povas jam komenci, precipe en landoj kun malalta valuto, ekz. en Vieno por tiu sumo oni povus jam fondi la presejon, eĉ aĉeti propran domon en la ĉirkaŭ-



Helsinki. — Foirhalo, konstruita de Lelin A. Lindqvist.

### La Stelo.

Orienta fabelo de V. V. Veresajev.

Tio okazis en tempoj delonge pasintaj, en malproksima, nekonata lando. Super la lando regis eterna, nigra nokto. Putraj nebuloj leviĝadis super la marĉa tero kaj sterniĝis en la aero. La homoj naskiĝis, kreskis, amis kaj mortis en malseka mallumego. Sed iafaje la spirado de la vento dispelis la pezajn elvaporigojn de l' tero. Tiam el malproksima ĉielo la homojn rigardis helaj steloj. Fariĝis universala festo. Homoj, po unu sidintaj en malhelaj, kiel kelo, loĝejoj, kunvenis sur placo kaj kantis himnojn al la ĉielo. Patroj montris al siaj infanoj la stelojn kaj instruis, ke en aspiro al ili konsistas la vivo kaj feliĉo de la homo. Junuloj kaj junulinoj avido rigardadis ĉielon kaj flugis anime al ĝi el la mallumego premana la teron. Al la steloj preĝis la profetoj. La stelojn prikantis poetoj. Scienculoj lernis la vojojn de l' steloj, llian mason, grandecon, kaj faris grandan eltrovon: montriĝis, ke la steloj malrapide sed senhalte alproksimiĝados al la tero. Dek mil jarojn antaŭe — tiel diris tute aŭtentikaj fontoj — pro mallumo malfacile estis distingi rideton sur vizaĝo de infano ĉe distanco de unu kaj duono da paŝoj. Sed nun ĉiu facile distingis ĝin jam el distanco de tri paŝoj.

Forestis ĉia dubo, ke post kelkmilionoj da jaroj la ĉielo ekradios helaj fajroj, kaj sur la tero fariĝos regno de eterna, radiobrilanta lumo. Ĉiuj pacience atendis la feliĉegan tempon kaj, esperante ĝin, mortis.

Tiel forpasadis la vivo de l' homoj, senbrue kaj trankvile, varmigate per la kvieta kredo je malproksimaj steloj.

Foje la steloj sur la ĉielo lumis tre hele. Homoj sin puŝis amase sur la placo kaj en muta respekto levigis anime al la eterna lumo. Subite el la amaso eksonis voĉo: „Fratoj! Kiel lume kaj mirinde estas tie, en la altaj ĉielaj ebenajoj!“

Kaj ĉe ni, tie ĉi, kiel malseke kaj mallume estas! Sopiras nia animo, ĝi ne havas vivon kaj liberon en eterna mallumego. Kian utilon ni havas, se post milionoj da jaroj la vivo de niaj malproksimaj idoj eklumigis per konstanta lumo? Ni, ni bezonas tiun lumon. Ni bezonas ĝin pli urĝe ol aeron kaj nutraĵon, pli multe ol patrinon kaj amatinon. Kiu scias, eble troviĝos vojo al la steloj. Eble, ni per forto povos ilin deŝiri de l' ĉielo kaj stariĝi ĉi tie, inter ni, je l' ĝojo de la tuta tero! Do, ni iru serĉi vojon, ni iru serĉi lumon por la vivo!“

La kunvenantaro silentis. Murmurete la homoj demandis unu la alian:

„Kiu estas tiu?“

„Tiu estas Adeil, junulo sensaĝa kaj malobeema.“

Ree estis silento. Kaj ekparolis la maljuna Tsur, instruanto de l' saĝuloj, la lumo de l' scienco:

„Karega junulo! Ni ĉiuj komprenas vian sopiron. Kiu ĝis nun ne suferis ĝin? Sed estas neeble al la homo deŝiri de l' ĉielo stelon. La rando de l' tero finiĝas per profundaj faŭkoj kaj abismoj. Post ili estas krutaj ŝtonegoj. Kaj tra ili ne ekzistas vojo al la steloj. Tion instruas la sperto kaj la saĝo.“

Kaj Adeil respondis:

„Ne al vi, saĝuloj, mi min turnas. Via sperto, kvazaŭ kataraktas, kovras viajn okulojn, kaj via saĝo blindigas vin. Vin mi kore alvokas, vi junuloj kaj kuraĝuloj, vin, kiujn ankoraŭ ne infektiis kaduka saĝeco!“

Kaj li atendis respondon.

Unuj diris:

„Ni volonte irus, sed ni estas la lumo kaj ĝojo por la okuloj de l' gepatroj niaj, kaj ni ne povas malĝojigi ilin.“

Aliaj diris:

„Ni volonte irus, sed ni jus komencis konstrui niajn domojn kaj devas ilin finkonstrui.“

Triaĵ diris:

„Saluton al vi, Adeil! Ni iros kun vi!“ Kaj leviginte multaj junuloj kaj junulinoj eksekvis Adeilon.

Ili iris en malluman, teruran malproksimaĵon, kaj la mallumego englutiis ilin.

Pasis multe da tempo.

Pri la forlirintaj venis nenla skligo. La patrinoj priploradis la sensece pereintajn infanojn, kaj la vivo forfluis kiel antaŭe. Denove en malseka mallumego naskiĝis, kreskis, amis kaj mortis la homoj, kviete esperante, ke post miloj da jarcentoj la lumo trapenetros ĝis la tero. Sed foje super la malluma rando de l' tero la ĉielo ete eklumigis per ekflagranta, tremeta brilo. La homoj puŝiĝis sur la placo kaj demandadis kun miro:

„Kio estas tie?“

Ĉiuhore la ĉielo pllumigis. Blauaj radioj glitis sur la nebuloj kaj trapenetris la nubojn, versante larĝan lumon sur la ĉielan ebenajon. Timigite la malserenaj nuboj buliĝis, puŝiĝis kaj kuris malproksimen. Pli hele disverŝiĝis sur la ĉielo la triumfantaj radioj, kaj tremeto, de ĝis nun ne sentita gajejo, trakturis la teron. Fikse rigardis malproksimen la maljuna profeto Satzoj.

Kaj profunde meditante li diris:

„Tia lumo povas veni nur de eterna ĉiela stelo.“

Kaj rediris Tsur, instruanto de l' saĝuloj, la lumo de l' scienco:

„Sed kiel stelo povus malsupreniĝi sur la teron? Ne ekzistas vojo al la steloj, kaj la steloj ne havas vojon al ni.“

Kaj la ĉielo lumiĝis, lumiĝis.

Kaj subite super la horizonto ekbrilis blindige-hela punkto.

„Stelo! Venas stelo!“ Kaj en ekstaza ĝojo la homoj kuris al ĝi renkonte.

Helaj, kiel tago, radioj pells antaŭ si la putrajn nebulojn. Dissirite, senorde, la nebuloj forkuregis kaj kuŝiĝis sur la tero. Sed la radioj batis ilin, ŝiris ilin je partoj kaj pells ilin en la teron. Eklumigis kaj puriĝis la malproksimaĵo de l' tero. La homoj ekrimarkis, kiel larĝa estas tiu malproksimaĵo, kiom da libera spaco etendiĝas sur la tero, kaj kiom da illaj fratoj vivas ĉiuloke.

Kaj en ekstaza ĝojo ili kuris renkonte al la lumo. Sur la vojo malrapide alpaŝis Adeil kaj alte tenis radiantan, deŝiritan de l' ĉielo, stelon.

Li estis sola.

Oni demandis lin:

„Kie estas la ceteraj?“

Per tremanta voĉo li respondis:

„Ĉiuj pereis. Perforte ni serĉis vojon al la ĉielo tra faŭkoj kaj abismoj. Ili mortis la morton de kuraĝuloj.“

Ĝojkriantaj amasoj ĉirkaŭis la stelportanton. Junulinoj superŝutis lin per floroj.

Tondris krioj de l' ravo:

„Gloron al Adeil! Gloron al li, kiu alportis la lumon!“

Li eniris la urbon kaj stariĝis sur la placo, kaj alte en la mano li tenis la radiantan stelon.

ajoj. — Decidi pri ĉi-imposto povus la Dekkvara en Helsinki. — Monon kolektus la naciaj organizaĵoj aŭ delegitoj de UEA. — Ĝi povus esti lokita en St. Banko Svisa kaj administrata de UEA, de C. O. aŭ de L. K., ĝis akcepto de rajtigita ia komitato, kiu ĝin disponos.  
Samideanoj; agu, fondu propran libroeldonejon!  
M. Kalina.

### Monumento Zamenhova.

Pro kaŭzoj, super kiuj la Organiza Komitato ne havas kontrolon, la eldono de la Kupon-kartoj avizitaj antaŭe iomete prokrastiĝis. Ni petas tiujn samideanojn, kiuj jam postulis ilin, iomete pacienciĝi. Ni ne povas respondi al ĉiu per aparta skribaĵo pro manko da tempo kaj ŝparemo de poŝt-elspezoj, sed ĉiu ricevos la necesan atenton. Ni esperas, ke kelkajn tagojn post la apero de ĉi tiuj linioj la kupon-kartoj estos je la dispo de ĉiu helpanto.

Dum la nuna semajno la Organiza Komitato elsendas specialan personan cirkuleron lereon al ĉiuj konataj Esperantaj organizaĵoj kaj ankaŭ al multaj personoj konataj pro sia preteco helpi ĉiam al nia afero. La Organiza Komitato tre esperas, ke la ricevontoj de tiuj lereoj respondos tre baldaŭ aŭ en okazo, se ili mem ne povas ĝin atenti, ke ili transdonos nian peton al siaj amikoj.  
Valoro de la Kupon-Karto. Sango. La Organiza Komitato decidis ŝanĝi la valoron por Germanujo ĝis 1000 gmk., ankaŭ por la Baltaj Ŝtatoj 1000 gmk. kaj por Aŭstrujo ĝis 20000 kr., la grava fato de ties valuto necesigis tion.  
J. D. Applebaum, hon. sekr. de la Org. Kom.

### Sciencistaj kunvenoj en Helsinki.

La XIV-a Kongreso en Helsinki estas tre grava por la Esp. movado inter la sciencistaro. En Praha ni plantis la ĝermantan semon de nia movado, kaj en Helsinki ni devas kontroli la duonkreskinton kaj ekzameni la metodojn ĝardenkulturaĵojn, por ke la juna arbo fortikiĝu, finkresku kaj donu bonajn fruĵojn.  
Tial ni organizos kelkajn kunvenojn de ISA kaj ĝiaj sekcioj (nuntempe estas proponataj apartaj kunvenoj por la sekcioj: kuracista = TEKA kaj pedagogia), kaj ni invitas jam nun ĉiujn ISA-anojn kaj interesatojn je multombra vizito. La Esperantistaro atentu: la Asocio ne estas ekskluziva, ĉiu estas bonvenanta al ni, kiu volas kunhelpi al niaj celoj!

En niaj kunvenoj (precipe ankaŭ en tiuj de TEKA) ni ankaŭ prezentas sciencajn raportojn. Ni petas la sciencistojn, kiuj afable volas subteni nin, ke ili kiel eble plej baldaŭ skribu al ni la temojn, pri kiuj ili volas paroli, kaj la antaŭvid-eblan daŭron de siaj prelegoj.  
Plue ni petas, ke ĉiu, kiu volas partopreni en la sciencistaj kunvenoj, sendu al ni poŝtkarton anonciant tion, ke ni povu iom destini pri la loko bezonata!

La korespondantojn oni sendu plej bone al la komuna adreso: Al la Loka Kongresa Komitato de la XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinki, por s-o Lauri Lappi. Tiu ĉi sinjoro prenis sur sin la taskon aranĝi la kunvenojn de ISA, kaj li sendos la korespondantojn rilate TEKA al s-o D-ro Salokannel, kiu aranĝos la kunvidon de TEKA!  
Vi ĉiuj helpu al efika sukceso de niaj sciencistaj kunvenoj en Helsinki!

- Por la LKK: Lauri Lappi, Helsinki.
- TEKA: D-ro Salokannel, Pukiharju.
- ISA: D-ro Döhler, Riesa.

### Intern. Antaŭkongreso en Lübeck.

Eksterlandaj gesamideanoj, ne timu tro altajn prezojn dum nia kongreso! Ni zorgos, ke oni ne ekspluatos aŭ eĉ elrabos vin, postulate de vi senhontajn prezojn. Laŭ tio, se vi ne havas specialajn bezonojn, sufiĉos por la kvar antaŭkongresaj tagoj en Hamburg kaj Lübeck-Travelmünde 1000—1500 gmk. (sen vojaĝkostoj).  
Aliĝoj okazis ĝis nun el 16 diversaj landoj. Post 15. julio la kongreskotizaĵo altiĝos je 50%, tial: tuj aliĝu!

#### Nova vojo al Helsinki.

Ĉar la ŝipo „Mira“, elirona el Lübeck la 5. aŭgusto estas jam preskaŭ plenokupita, ni klopodis trovi plian okazon, vojaĝi al Finnlando. Ni intertraktadis kun la ĉi tiea ŝipagentejo Giehl & Fehling kaj sukcejis, ke ĝi ŝanĝis la horaron de la tre komforta kaj rapida ŝipo „Halland“ tiel, ke ĝi forlasos Lübeck la 5. aŭgusto je 5 h. pm.

La ŝipoveturos al Abo (Turku). Tie atingos la pasageroj la vagonaron, forveturontan el Abo la 8. aŭg. je 7<sup>10</sup> h. matene, alvenontan en Helsinki je 1<sup>26</sup> h. tagmeze. Tiamaniere la vojaĝantoj vidos belan parton de la suda Finnlando, elspezante nur 39 fmk. por la fervoja vojaĝo. La ŝipagentejo konsentis—kvankam alie la prezoj estas pli altaj—la samajn prezojn, kiujn postulas la ŝipoj al Helsinki, nome 640 fmk. por I. klaso, 560 fmk. por II. klaso (kun lito kaj manĝo). Mendojn sendu tuj, aldonante la necesan monon al nia kasisto: s-o Selmer, Lübeck, Falkenwiese 11.  
Ankaŭ la vojaĝantoj sur tiu ŝipo povos partopreni nian tutan antaŭkongreson.  
Lübecka Kongresa Komitato: D-ro A. Möbusz.

Pro multaj kaŭzoj, ĉefe la altaj prezoj kaj la nesufiĉa atento je projekto, la sendo de speciala ŝipo al Helsinki ne ebligis. Kiu tamen deziras viziti Danzigon antaŭ ol veturi Helsinki-on estas atentigata je komunikoj en ET n-o 91 sub Stettin. Por atingi la kontakton, la forveturo de Danzig estas la 4-an tagmeze 11.47 kaj alveno Stettin je 7 h. posttagmeze. Tiel ebligas partopreni je la gvldo tra Danzig la 3-an, same je la gaja kuesto en la malnova domo Langgasse 71, kiu estos ornata per verda flago aŭ pli poste per lumigata verda stelo. La veturo de Danzig al Stettin kostas 192 gmk. (III kl.). La vizo por Helsinki kostas 360 gmk. kaj estos donata senprokraste de la ĉi tiea finna konsulo Ni sciligas, ke en tiuj horoj la estimata edzino de nia kara Mastro estos en nia rondo.  
K. K. K.

### Feriaj interŝanĝoj.


Laŭtempa propono de Prof. D-ro Ledermann, Nürnberg.  
La someraj ferioj alproksimiĝas kaj miloj da samideanoj ĉiulandaŭ plezurege pakus siajn kofrojn, por pasigi kelkajn semajnojn en najbara lando, se la teruraj vojaĝkostoj ne estus. La veturado mem, la mastrumado kaj dumnoktado en la hoteloj la multaj kromaj neeviteblaj elspezoj sumiĝis en la lastaj jaroj tiom, ke eĉ la riĉulo devas limigi sian vojaĝemon, des pli la riĉulo. Tamen la deziro viziti refoje fremdajn landojn kaj studadi tieajn homojn kaj cirkonstancojn, estas pli forta ol iam ne nur ĉe unu popolo, sed ĉe ĉiuj. Sed kiel forigi la financajn malfacilaĵojn kaj trovi vojon por realigi la vojaĝprojektojn de la ferioj?

Samaj intereso, laŭproverbe, kunigas la samecianojn. Bone, kunigu vin, diverslandaj vojaĝemuloj, farante interkonsenton pri reciproka, kompensa gastigo por kelkaj semajnoj. Franca samideano ekz. vojaĝu al belga amiko, angla al holanda, germana al itala ktp., kaj la

gastiginto poste restadusamlonge kaj samkondiĉe ĉe sia gastigito. Eĉ geedzaj povus tiucele interkonsenti. La multnombraj avantaĝoj de tia reciproka aranĝo estas ja evidentaj. Unue ĝi signifus treganfinancan plifaciligon; ĉar trovante senkoston restadejon ĉe gastamiko, oni devus pagi ĉefe nur la vojaĝbileton. Krom tio oni havus la feliĝigan sentadon, loĝi sendangere ĉe samideana familio, kaj interkompreniĝi ne penplene, sed facile kaj ĉiurilate. Ankaŭ spirite tiaj feriaj interŝanĝoj alportus ŝatindan profiton, perante okazon por ekoni elfunde fremdajn landon, homojn, lingvon, kutimojn kaj naciajn specialaĵojn. Restadante en iama malamika lando, oni baldaŭ ekkonus, ke troviĝas tie ankaŭ honestaj kaj ŝatindaj homoj, kaj malsatante la malamajn dirojn de la ŝovinistoj la gastigito post reveno en sian landon, multe povus kontribui al la interpola repaĉigo kaj interfratiĝo. Kaj ĉiujn tiujn financajn, spiritalajn kaj moralajn agrablaĵojn de fremdlanda restadejo oni povus ĝuadi senĝene, bonhumore kaj bonkonscience, rememorante, ke ja baldaŭ prezentigis bona okazo por kompensi al sia kara gastiginto ĉiujn amikaĵojn kaj amindaĵojn en propra hejmo.  
Bonege, diros verŝajne multaj legintoj. Sed kiel trovi konvencajn praktikajn proponojn? Nu, mi provos fari ankaŭ ĉiurilate praktikajn proponojn. Por ĉi tiu jaro sufiĉos, anconi sian pretecon pri reciproka gastigo en internacia ĉeforgano (Esperanto, Esperanto-Triumfonta) aŭ en la ĉefgazeto de la vizitota lando. Supozeble alvenos baldaŭ akceptaj

### Aliĝu al la antaŭkongreso en Lübeck!

(Adreso: Falkenstrasse 12.)



Lübeck. — Hospitalo de S-ta Spirito.

deklaroj. Por eviti postajn malagrablaĵojn, oni nun informu sin per la delegito de UEA pri la fidindeco de la gastigota persono. Se la informoj estis kontentigaj, pluaj detaloj kaj deziroj letere kaj rekte estu farataj kun la estonta gasto mem, ekz. pri daŭro de la restado, pretecoj pri mastrumado kaj lito, lokaj vivkondiĉoj, vidindaĵoj ktp. Tre dezirinde estas, ke inter la traktantoj estu sufiĉe da similecc rilate al profesiaj kaj ekonomiaj cirkonstancoj. Senluziigoj tiamaniere ne bone estas timeblaj. Pri la reciproka spertoj oni devus poste raportii en tiu aŭ tiu ĉi gazeto. Se la feriaj interŝanĝoj bone prosperis ĉi-jare, en venontaj jaroj oni starigu, eble laŭ aŭspicioj de UEA, specialan centrejon same kiel ekzistis antaŭ la milito simila aranĝo en Parizo, nome la „Societo por internacia interŝanĝo de infanoj kaj junuloj“, kiu celis malmultekostan eksterlandan restadon kaj havis laŭdire tre kontentigajn rezultojn.

Mi estas certa, ke la proponita aranĝo en la nunaj cirkonstancoj trovas amikojn en ĉiuj landoj, ke iom post iom multe da Esperantistoj volonte uzos ĝin, ke lastfine nia tuta movado multon profitos per tiaj peresperantaj interŝanĝoj.

### Karavano de Polaj Esperantistoj al antaŭkongreso Danzig kaj Universalaj Kongreso Helsinki.

La Delegitaro de UEA en Varsovio aranĝas karavanojn al antaŭkongreso en Danzig kaj de tie enŝipiĝi al Helsinki.  
Se kolektiĝos granda anaro al la kongreso, ni ricevos specialan vagonon. La Finlanda Ambasadoro promesis se eble faciligi la veturadon kaj rabatigi la vizon de pasportoj je 50%.  
Tiucele la Delegitaro de UEA petas kiel eble plej multnombre partopreni la antaŭkongreson Danzig kaj Universalan Kongreson Helsinki.  
Ĉar ricevo de pasportoj estas kunligita kun diversaj malfacilaĵoj estas konsillinde jam nun klopodi pro pasporto. Por vizigi la pasporton de ĉiuj partoprenintoj kaj por profiti de la rabato, la delegitaro petas ĉiujn sendi la necesajn ne pli malfrue ĝis 25. 7. La forveturo el Varsovio okazos grandare la 3-an de aŭgusto matene de la Centra Stacidomo. Adreso: Adolfo Oberrotman, del. de UEA, Varsovio, Krak-Przedm. 10.

### XII-a Germana Esperanto-Kongreso en Plauen (Vogtlando).

Kore ni dankas al la partoprenintoj de la Breslaŭa kongreso, ke ili afable akceptis nian inviton por la venonta kongreso en Plauen. Estas nia plej alta celo, ĉion prepari laŭ la deziroj de la Esperantistaro. Ĉefe ni volas aranĝi okazon por sincera laboro. Sed ni intencas aranĝi ankaŭ amuzajn horojn per muziko kaj prezentadoj el la bela arto. Krom tio troviĝos certe sufiĉe da tempo por montri al niaj gastoj la belajn kaj vidindaĵojn de Plauen kaj de ĝia ĉirkaŭaĵo.  
Plauen estas lokita preskaŭ en la mezo de Germanujo. Pro tio ni esperas, ke ni povos saluti Esperantistojn ne nur el ĉiuj partoj de nia patrulando, sed ankaŭ multajn najbarajn eksterlandanojn, por ke la adiaŭaj vortoj „ĝis revido en Plauen“, tiel ofte aŭditaj en Breslaŭ, realigu!

Sindone por la grupoj Auerbach, Falkenstein, Gera, Mylau, Plauen, Reichenbach kaj Werdau  
Willy Rödel Plauen i. V., Fürststr. 66.  
Hermann Schneider Plauen i. V., Gunoldstr. 40.

### La nombro de la aliĝintoj al la XIV-a ĝis 6. Julio estas 825.

La Loka Kongresa Komitato sukcesis ricevi grandan nombron da malkaregaj komunaj loĝejoj por malriĉaj kongresanoj. Tiamaniere la tagkostoĵ povos esti limigotaj je 20 Fmk.

Kaj en la tuta urbo komenciĝis ĝojegado.  
\* \* \*  
Pasis la tagoj.  
Ankoraŭ hele radiis sur la placo la stelo en la alte levita mano de Adell.  
Sed jam delonge en la urbo ne regis plu ĝojego. La homoj iradis malbonhumore kaj nubovizaĝe, mallevinte la rigardojn, kaj apenaŭ ne rigardis unu la alian. Kiam ili devigite iris trans la placon, iliaj okuloj, ekvidante Adellon, ekbrulis pro forta malamikemo. Nenia kanto, nenia preĝo estis aŭdata. Anstataŭ la putraj nebuloj dispelitaj de la stelo super la urbo per nevidebla nebulo densiĝis nigra malsarena kolero. Ĝi densiĝis, kreskis, kaj etendiĝis. Kaj sub ĝia premeĝo neble esis vivi.

Kaj jen ploregante homo kuris sur la placon. Brulis liaj okuloj, la vizaĝo aliĝis pro kolero, disŝiranta lian animon. En freneza furiozo li kriis: „For la stelon! For la malbenindan stelportanton! Fratoj, ĉu ne ploregas la animoj de vi ĉiuj per miaj lipoj! For la stelon, for la lumon, — ĝi senigis nin je vivo kaj ĝojo! Ni pace vivis en mallumo, ni amis niajn karajn loĝejojn, nian senbruan vivon. Kaj rigardu, — kio okazis? Venis la lumo, — kaj forestas la agrableco en ĉio. Kvazaŭ kadukaĵ malbonformaj masoj kuntuŝiĝas la domoj. La folioj de l' arboj estas palaj kaj glaciaj kiel la haŭto sur la ventro de rano. Ekrigardu la teron, — ĝi tuta estas kovrita de sanga marĉo. Kiu scias, de kie venas tiu sango? Sed ĝi gluigiĝas al la manoj, ĝia odoro akompanas nin ĉe la mangado kaj en la dormo, ĝi venenas kaj senfortigas niajn fervorajn preĝojn al la steloj. Kaj nenie estas sava de tiu aroganta, ĉien penetranta lumo. Ĝi ĉirkaŭas niajn domojn, kaj jen ni vidas: ĉiuj ili estas kovritaj per koto; kaj la koto penetris en la murojn, kovris la fenestrojn,

malbonodoraj restajoj amasiĝis en la anguloj. Ni ne povas plu kisi niajn amaĵojn: ĉe la lumo de la Adell'a stelo ili fariĝis pli abomenaj ol la tombaj vermoj; iliaj okuloj estas palaj kiel skolo-pendroj, la molaj korpoj estas makulitaj kaj briletas kvazaŭ ŝimo. Kaj jam ni ne povas rigardi unu la alian, — ne homon ni vidas antaŭ ni, sed homaĉon... Ĉiu nia sekreta paŝo, ĉiu kaŝa movo estas lumigata de la senkompata lumo... Estas neeble vivi! For la stelportanton, pereu la lumo!”

Kaj la aliaj kriis kontente:  
„For! Vivu la mallumego! Nur malĝojon kaj malbenon alportas al la homoj la stela lumo...”

„Morton al la stelportanto!”

Kaj minace ekscitiĝis la homamaso.  
Kaj furioze kaj brue ĝi entuziasmiĝis sufokante en si la teruron pro la mallaŭdo al la lumo.  
Kaj ili ekmoviĝis kontraŭ Adeil.  
Sed mortige-hele radiis la stelo en la mano de l' stelportanto, kaj la homoj ne povis proksimiĝi al li.  
„Fratoj, haltu!” subite aŭdiĝis la voĉo de la maljuna profeto Satzoj. „Malindan pekon vi ŝarĝas sur viajn animojn, malbenante la lumon! Al kio ni preĝas, per kio ni vivas, se ne per la lumo? Sed ankaŭ vi, mia filo”, li diris al Adeil, „ankaŭ vi faris ne malpli grandan pekon, alportante la stelon al la tero. Vere, la granda Bramo diris: „Feliĉega estas tiu, kiu aspiras al la steloj.” Sed la homoj arogantaj pro sia saĝeco, malĝuste komprenis la vorton de la plej alta Eŝtro. Disciploj de liaj disceptoj klarigis la veran sencan de l' malfacile komprenebla vorto de la Plejsaĝa: la stelojn la homoj aspiru nur en deziro, sed sur la tero la mallumego estas tiel sankta kiel sur la ĉielo — la lumo.

Ĉi tiun veron malrespektis via leviĝinta saĝo. Pentofaru do, mia filo, forjetu la stelon, kaj sur tero ekregu la antaŭa paco!”  
Ekridetis Adeil.  
„Kaj vi pensas, se mi ĝin jetos, — ke la paco sur tero ne pereis jam por ĉiam?”  
Kaj kun teruro la homoj eksentis, ke Adeil diris la veron, ke la antaŭa paco neniam revenos. Tiam eliris antaŭen la maljuna Tsur, instruanto de l' saĝuloj, la lumo de l' scienco:  
„Senprudente vi agis, Adeil, kaj nun vi mem vidas la fruktojn de via senprudenteco. Laŭ la leĝoj de l' naturo la vivo malrapide disvolviĝas. Kaj malrapide alproksimiĝas al la vivo la malproksimaj steloj. Ĉe ilia lumo iom post iom alproksimiĝanta grade aliformiĝas ankaŭ la vivo. Sed vi ne volis atendi. Je via propra risko vi deŝiris stelon de l' ĉielo kaj hele eklumigis la vivon. Kio do okazis? Jen ĝi estas antaŭ ni, — kotaja, mizera kaj kripla. Sed ĉu pli frue ni ne sentis, ke ĝi estas tia? Kaj ĉu tio ĉi estis nia tasko? Ne estas signo de granda saĝeco deŝiri de l' ĉielo stelon kaj lumigi per ĝi la neperfektaĵojn de l' tero. Ne, prenante sur vin la nigran, malfacilan laboron, aliĝi la teron, vi spertos, ĉu estas facile purigi ĝin de l' amasiĝinta dum jarcentoj koto, ĉu estas eble forlavi ĉi tiun koton eĉ per tuta maro da plej radiobрила lumo. Kiom da naiva malprudento en via ago, kiom da mal-kompreno de l' kondiĉoj kaj reguloj de l' vivo! Anstataŭ ĝojo vi alportis sur la teron malĝojon, anstataŭ paco — malpacon. Sed vi povus kaj nun povas esti utila al la vivo: disrompu la stelon, prenu de ĝi nur etan fragmenton, — kaj tiu ĉi fragmento lumigos la vivon tiom, kiom estos necese por fruktodona kaj prudenta laboro en ĝi.”  
Kaj respondis Adeil:

„Vi diris la veron, Tsur! Ne ĝojon alportis ĉi tien la stelo, sed malĝojon, ne pacon, sed malpacon. Ne tion mi esperis, transrampante la krutajn stonegojn al la steloj, kiam ĉirkaŭ mi falis en abismon la kamaradoj... Mi pensis, ke almenaŭ unu el ni atingas la celon kaj alportos al la tero stelon, ke pro hela lumo fariĝos sur la tero hela, lumiga vivo. Sed kiam mi staris sur la placo, kiam mi ĉe lumo de l' ĉiela stelo ekvidis vian vivon, mi komprenis, ke frenezaj estis miaj revoj. Mi komprenis, — ke la lumon vi bezonas en la neatengebla ĉielo, por surgenii antaŭ ĝi en solenaj minutoj de l' vivo. Do sur la tero al vi pli kara ol ĉio estas la mallumego, por kastiĝi unu de alia kaj, ĉefe, por ĝoĝi pri via mallumo, de l' ŝimo trapenetrita vivo. Sed eĉ pli forte ol antaŭe, mi eksentis, ke estas neeble porti tian vivon. Per ĉiu guĉo de sia putra sango, per ĉiu makulo de l' malseka ŝimo ĝi ploregas al la ĉielo... Cetere, mi povas vin konsoli: mia stelo ne lumos longatempem.

Tie, sur malproksima ĉielo pendas steloj kaj lumas per si mem. Sed stelo deŝirita de l' ĉielo, forportita teren, povas lumi nur nurante sin per la sango de tiu, kiu ĝin tenas. Mi sentas, ke mia vivo kvazaŭ per meĉo, leviĝas el mia korpo al la stelo kaj tie forbrulas. Post mallonga tempo mia vivo tute estos forbrulinta. Kaj estos malmale al tiu ajn konservi la stelon: ĝi estingigos kune kun la vivo de tiu, kiu ĝin portas, kaj ĉiu devas denove akiri stelon. Kaj al vi mi turnas min, kiuj vi estas honestaj kaj kurajaĵ en koro. Ekkoninte la lumon, vi jam ne volos vivi en mallumego. Do iru la malproksiman vivon kaj alportu ĉi tien novajn stelojn. Longa kaj malfacila estas la vojo, sed tamen, por vi ĝi jam estas pli facilaj ol por tiuj, kiuj unuafoje irante sur ĝi pereis. La vojeto estas trovita, la vojeto signita. Kaj vi

## Danko de rusaj malsatantoj.

La gvidanto de fako „Helpe por Malsatantoj“ ĉe Sovjetlanda Esp. Servo en Moskvo, s-o Radnikov skribas al ni interalie:

... permesu al mi uzi vian bonkoron por esprimi, per via ŝatata ET, en la nomo ne nur de niaj malsatantaj samideanoj, sed en la nomo de l' tuta rusa malsatantaro, la plej profundaj kaj sinceraj dankoj, por ke la voĉo de malfeliĉegularo ne restis senrezulta.“

Li daŭrigas per la alvoko:

**Eksterlanda Esperantistaro!** La malfeliĉego, kiu trafis nian karan Respublikon, estas terurega. Ni havas 30 milionojn da malsatantoj, la neprikskribablaj turmentoj nepre kaj senlace postulas la helpon de ĉiu honesta homo. — Sen ia longa babilado, sen iaj altstilaj frazoj:

**Apud-Volga regiono mortas pro malsato; homoj fariĝas kanibaloj. Rapidegu ilin savi!**

La redakcio de ET ricevis lastatempe denove multajn kortuŝajn leterojn de malsatantaj samideanoj. Volonte ĝi akceptas donacojn de bonkoraj gesamideanoj.

## 3000 frankoj kolektitaj de laborista Esp. grupo.

La Laborista Esp. Grupo de Lyon aranĝis la 5. majo belegan feston je la nura profito de rusaj malsatantoj. Mil personoj ĝin ĉeestis en la vasta Muzika Palaco. Oni ludis organon, kantis kaj prezentis francan teatraĵon. Poste Lucien Valmorée faris interesan paroladon por Esperanto, kaj li precipe interesis la aŭdantaron, kiam li alparolis Esperante la ĥinajn samideanojn, kiuj dekoje ĉeestis.

— La teruriga, animprenanta filmo de D-ro Nansen vekis grandan kompton. Ho, malfeliĉaj ili estas... malsatantoj! Kaj dum tia terura tempo lukŝaj aŭtomobiloj rapidegas al la dolĉoplena azura marbordo, portante vivĝuemojn kaj diboĉulojn kun ventraj plenejoj.

La monon kolektitan — 3000 frankojn — oni sendis duone al Komitato Nansen, duone al Rusa Ruĝa Kruco en Bern. Imitinda ekzemplo por ĉiuj Esperantistoj!

Sanino E. S. el Hamburg petas nin publikigi la jenon:

